


Nr-o 71 **1987/1 Marto** **18a jaro**

Informilo de Esperanto Ligo Filatelista
– Faka asocio en UEA –









★ Por ĉiu serio de poŝtmarkoj estas presataj unuatagaj kovertoj kun simbolaj desegnaĵoj kaj specialaj stampiloj.

Informilo de ELF-AREK (Faka asocio en UEA)
Esperanto Ligo Filatelista
Amika Rondo de Esperantaj-Kolektantoj

Prezidanto/Kasisto: Ivar Paulsson, Skytteholmsvägen 29, S-171 44 Solna

Stampobanko: Werner Heimlich, Fröbelstr. 4, D-3040 Soltau

UEA-konto: elfx/r

Poŝtkonto: 51 57 85-4, I. Paulsson, Solna, Svedujo

Kotizo por 1987: 15 poŝtaj respondkuponoj, maldekstre stampitaj (!), aú 45 svedaj kronoj, (15.– germanaj markoj, 7,5 usd). Per aliaĵoj nur post antaúa konsento.

Nun ni estas ene

en nia Jubilea Jaro! Hodiaú, finante tiun ĉi manuskripton, estas la 13a de januaro 1987. Regas ekstrema vintro. Kaj mi estas feliĉa, povi sidi hejme apud varmega forno kun taso da teo. Kiel ĉiam, necesas kelkaj enkondukaj vortoj. La prezidanto, Ivar Paulsson, kaj mi, la redaktoro, tre kore dankas al ĉiuj tiuj niaj klubaj geamikoj, kiuj sendis gratulojn okaze de la jarŝanĝo. Kaj mi tre ĝojis, ke multaj ankaú trovis bonajn vortojn por nia informilo. Min antingis je 70 gratulaĵoj. Tio donas forton daúrigi la laboron por nia informilo.

Sincere salutas via redaktoro
R. Burmeister, W.-Firl-Str. 30, Karl-Marx-Stadt, DDR 9047

Necesaj vortoj . . .

la kotizo ampleksas 15 respondkuponojn, aú supre cititan egalvaloron. Pro samideana helpemo ni ĝis nun sendis nian informilon ankaú al tiuj, kiuj pagis multe malpli. Tamen, tion praktiki plue ne eblas. Eĉ tiuj, kiuj loĝas en t.n. "nepagipovaj landoj", havas eblecon, pagi kotizon plenan. Kompreneble ne per irk. Sed per esperantaĵoj. Per *esperantaj* filatelaĵoj, kiuj vere abundas. Ne alsendu iujn nepetitajn poŝtmarkojn novajn. Tiuj ne estas vendeblaj. Ofertu vian materialon unuavice al nia stampobanko.

Sendu vian mankoliston

al nia stampobanko! Okazas, ke alvenas unuopaj stampoj, kiujn oni ne listigas en la oferto-listoj. Nia stampobanko bonege funkcias! Dankon al nia amiko Werner Heimlich pro lia senlaca laboro, kiun li senbrue jam dum multaj jaroj plenumas!

Anoncoj

Esperanto Klubo "Volga Stelo"

deziras korespondi tutmonde kaj interŝanĝi filatelaĵojn pri Esperanto kaj aliaj temoj.
Adreso: SU 410 002 Saratov 2, abon kesto 301, Esperanto-klubo Volga Stelo.

Trimil gmk (FRG)

vi ricevos, se vi kunhelpos, trovi ŝtelistojn. Ili el pm-ekspo en Duisburg ŝtelis nokte 461 ekspofoliojn kun altvalora filamaterialo. Inter alie:
Temo Gorch-Fock-ŝipo, kov. al Karrenberg, autografo de Windt,
Tago de pm, kov. al Schinner,
Temo H. Stephan, 1 folio da brunaj provpresoj,
Temo FRG-armeo, tut. al Karrenberg, aútografo de Straúss,
Temo Hermeso-kapoj, mankhavaj prespladoj kaj kolordiferencoj,
Malajzia/Irako, kov. al Dräger.
Skribu al: H-G Diesenhoff, D 4100 Duisburg 14, Annastr. 24

Esperanto-poŝtmarkoj

Kubo surprizis ĉiujn!

Hector Juarez-Figueredo, nia kluba amiko el Kubo, per letero de 25a de oktobro 1986 sciigis, ke la Kuba Ministerio pri Komunikado oficiale sciigis, ke la 16an de marto 1987 aperos 30-centava poŝtmarko okaze de la Centjaro de Esperanto. La marko estas verkita de la grafikisto Miguel Angel Penate, konata desegnisto de kubaj poŝtmarkoj, kiu estas subtenanto de Esperanto. Penate ankaú desegnis la unuatagan poŝtan stampon kaj la unuatagan koverton por tiu eldono.

Komence de januaro mi ricevis de Figueredo la oficialan poŝtan komunikon 4/87 en kvar lingvoj, i.a. en Esperanto pri la eldono de tiu ĉi jubilea poŝtmarko kun ĝia bildo kaj ĝia akompana stampo.

Jen la datoj:

Eldontago:	16a de marto 1987	Koloroj:	Multkolora
Kvanto:	1. 145. 100 pecoj	Dentumo:	12,5
Nominalo:	30 centavoj	Desegnisto:	Miguel Angel Penate
Papero:	Kalandrita (Kromo-) papero		

Sube de la komuniko la sciigo, ke la eldonon akompanas unuatagaj stampo kaj koverto.

Mi ne detale priskribas la markobildon, ĉar esperas, povi prezenti al vi bildon pri ĝi en nia LVL. Sur la marko troviĝas portreto de Zamenhof kun aútografo kaj faksimilo de la sovetunia E-pm de 1927, kiu posedas la Zamenhofan porttreton. La unuataga stampo montras mapon pri Kubo kun E-stelo.

Ni direktas nian plej koran gratulon al Kuba Esperanto Asocio pro tiu elstara atingaĵo kaj kontribuo al nia Jubilea Jaro. Kaj same ni kore dankas al nia kluba amiko Figueredo pro la rapida informado. Kiam vi tenas ĉi informilon en viaj manoj, eble jam vi posedas la jubilean kuban markon. Nun, kiam mi skribas ĉi liniojn, estas la 8a de januaro 1987, nokte regis 20 minusgradoj laú Celsius-mezuro, en Leningrado eĉ 30 minusgradoj. Tamen: tiu ĉi sciigo nin varmigas kaj ĝojigas!

Denove pri la bavara E-pm

Bonan rezulton havis, ke denove mi tuŝis pasintnumere tiun talonan markon. Intertempe konatiĝis la sesa ekzemplero en nia klubo: en Usono kluba amiko ĝin akiris antaú kelkaj jaroj kaj pagis 75 dolarojn. Nia amiko Werner Heimlich sendis fotokopiojn, kiuj ebligas, doni konkretigajn detalojn. Mi ne scias, ĉu eblas montri en nia LVL tiujn kopiojn, tial mi devas priskribi la aferon:

Nia E-pm troviĝis kun almenaú dua alia en folieto. La dua portas la tekston (en germana) "Instruejo por bierfaristoj . . . Munkeno". La folieto kun nia E-pm ŝajne posedas la numeron 4. Horizontale en ĝi regas la jena ordo:

Talono "bierfaristoj" /pm/pm/pm/pm/ talono "Esperanto" (Lasta duono de tiu horizontala supra vico kapstare presita). La dua vico horizontala en la folieto (verŝajne) havas la ordon:

Talono "Esperanto" /pm/pm/pm/pm/ talono "bierfaristo". Sur la marĝenoj troviĝas ĉirkaúe dika streko, supre kun n-ro 4. Laú mia opinio interesaj faktoj. Trovi kompletan tian folion estus granda afero, sed ne verŝajna. Eble ni en pm-ekspozicioj serĉu.



Nova Esperanto-poŝtmarko en Pollando 1987

Nia nova kluba amiko Roman Wiktor Rutkowski el la movadfama Bydgoszcz informis per dato 8.12.86 la jenon:

La revuo de la Pola Filatelista Asocio n-ro 21/1986 informis pri eldono de poŝtmarko "okaze de 100a datreveno de ekesto de la lingvo Esperanto" en la jaro 1987. Oni planas nominalan valoron de 45 zlotoj. Koran dankon al vi, amiko Rutkowski.

Ankaŭ E-alumet-etikedoj en Pollando 1987

Rutkowski informis ankaŭ, ke laŭ "List Informacyjnyj" n-ro 18, eldonita de la provizora estraro de PEA, 1987 en Pollando oni eldonos ĉirkaŭ 70 milionojn da alumet-etikedoj kun E-motivoj. Eble tiun informon mi devus vicigi en nian rubrikon pri glumarkoj, ĉar ja fakte estas glumarkoj por alumetskatoloj.

Nia E-pm 24 posedas tri dentumojn!

Nia kluba amiko František Patera en la ĉeĥa Hořice atente legis la informon pri nia E-pm 24 en LVL 70 kaj tuj komencis kontroli siajn duoblaĵojn kun miriga rezulto! Li skribis al mi: Mezurinte miajn duoblaĵojn de la brazila poŝtmarko "Ora jubileo de Esperanto" de 1937a jaro mi konstatis, ke ankaŭ mi posedas tiun markon kun la dentumo 11 kaj kun dentuno 12. Tamen plej grava surprizo estis, ke mi trovis trian dentumon: 12:11. Mi kredas, ke tiu ĉi sciigo interesos niajn legantojn! . . .

Kompreneble! Koran dankon al vi pro tiu por ni valora sciigo!

Esperanto-poŝtmarko en Malto

John Vella-Bondin, sekretario de Esperanto Societo Malto sciigis al ni la jenon: La poŝtestro de Malto sciigis la 9an de januaro aperigon de Esperanto-poŝtmarko. Tago de la eldono: 10-a de junio 1987. Teknikaj datoj ankoraŭ ne konataj. Gratulon al John Vella-Bondin, kiu sukcesis konvinki la poŝtestron de Malto!

Jubilea E-pm en Ĉinio

Laŭ sciigo de Song Shengtan kaj de s-ro Ĉin Kajĝi la ĉina poŝto aperigos 14an de julio 1987 jubilean poŝtmarkon. Nominalo: 20 fenoj. Akompanos ĝin poŝta unuataga koverto kaj unuataga E-stampo.

Jubilea E-pm en Bulgario

Laŭ sciigo de s-ano Todorov, estrarano de BEA, la bulgara poŝto eldonos 1987 jubilean E-pm. Akompanos ĝin unuataga koverto kaj unuataga E-stampo. BEA planas festan ceremonion okaze de ĝia eldono.

Jubilea E-pm en Germana Demokratia Respubliko

Laŭ sciigo de la poŝta ministerio de GDR en julio 1987 aperos jubilea E-pm. Nominalo: 85 pfenigoj. Temas pri unu poŝtmarko en memor-bloko. Sur la pm estas portreto de Zamenhof. Sur la bloko aperas tekstoj en germana kaj Esperanto.





Poŝtaj stampoj

La nekonata stampo de Zagreb 1985

Ne estis sinjorino Almaŝi en JU, kiu reagis je mia demando en nia LVL n-ro 70 pri tiu stampo. Bedaúrinde ŝi tute ne kunlaboras por nia informilo, kvankam ŝi estas nia unusola membro en JU. Nia kluba amiko Michel Legris sendis fotokopion pri tiu stampo, kaj tial ni hodiaú povas doni al vi informojn pri tiu stampo, kaj devas iom renversi nian katalogan ordon.

La stampo troviĝas sur memoriga karto, afrankita per 5-dinara pm. La karto posedas la enpreson: H.F.D. – Zagreb, br. 1/85 Z.K. Sur la maldekstra flanko estas mapo pri Argentino kun la indiko pri Islas Malvinas. Sub ĝi: KORATIA ESPERANTO LIGO 28.I. – 5.II.1985. Supre dulingve: LA TAGOJ DE ARGENTINO EN ZAGREB.

La ronda stampo portas la tekston en supra rondo:
SEMANA ARGENTINA/SEMAJNO DE ARGENTINO,
kaj en la suba rondo: 41101 ZAGREB 28.01.1985
TJEDAN ARGENTINE

En la mezo estas bildo pri suno, ambaúflanke E-steloj. La stampo estas tre pure presita. Dankon al nia amiko Michel Legris, kiu ŝajne sola posedas tiun stampon.

Eble "Israelo 1"

Nia nova kluba amiko Roman Kubczyk el la urbo de la Nigra Madono afablis sendi al la redaktoro fotokopion pri ricevita salutkarto el la 42a TEJO-kongreso, okazinta 14–21 aúgusto en Neurim. Sur ĝi stampo kun hebrea kaj esperanta tekstoj. La esperanta tekstas: 42a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO . . . ESPERANTO NEURIM. En la mezo de la stampo la kongresa emblemo: oranĝo (?) kun kvinpinta stelo. Sed ankaú normala maŝinstampo nuligas la pm. Sur la karto ankaú alvenstampo de Bialistoko.

La kvalito de la stampo: preskaú nelegebla. Tio validas ankaú por kvanto da ricevitaj stampoj, kiujn mendis Paulsson.

Mi supozas, ke la stampon mendis Jehoŝua Tillemann, prezidanto de Esperanto-Ligo en Israelo kaj ĉefdelegito por tiu lando de UEA. Iam li estis membro en nia klubo. Koran dankon al Kubczyk! Dank'al li ni scias, ke en la TEJO-kongreso estis stampo. Detalojn ni klopodas akiri pri tiu stampo.

Nerimarkita stampo de 1972! (BE 14 A)

Estis nia Jean Amouroux, kiu sendis al mi fotokopion pri maŝinstampo kun pri-esperanta teksto el la belga Charleroi el la jaro 1972. Kaj li demandis: ĉu de vi konata? Mi respondas: ne!

Intertempe mi eksciis, ke tiu stampo funkciis dum du monatoj de 1972, sed la precizan tempon mi ne scias, nek la mezuron de tiu stampo.

La tp de la ms posedas la tekston:
ESPERANTO/Langue/Internationale/Auxilaire
kaj kvinpintan stelon.

La fotokopio montras gazet-banderolon de la belga bulteno:
L'ESPERANTO EN MARCHE.

Bedaúrinde ĉe la E-istoj en Charleroi tiu stampo ne troviĝas. Eble oni ĝin povus trovi ĉe la ricevintoj de tiu bulteno . . .

Kian numeron doni al ĝi en nia katalogo? Provizore mi uzos: 14 A. Jam foje nin surprizis la nuna BE 2. Sekvonta katalogo do denove havos renversitan numeran ordon!

Pri BU 15 (koloroj)

Nia "Suplementa aldono" en LVL 70 notis: ruĝa, nigra. Intertempe mi ricevis kovertojn (de nefilatelistoj!) kun viola kaj verda stampoj. Do, ni povas esti certaj, ke poŝte oficiala koloro nur estas la nigra.

Aperis BU 16 (Vraca)

Estis nia amiko Amouroux, kiu sendis fotokopion pri nova 5-stotinka tutaĵo posedanta novan poŝtan apudstampon (as). Intertempe mi klopodis pro ĝi (La Esperanto-klubo Verda Raketo en Vraca tute ne respondis je mia demando) kaj ricevis ekzempleron de mia nefilatelista amiko. Bone, ke la Amouroux-kopio estas perfekta, tial mi ĝin povas prezenti hodiaú al vi!

La stampo BU 16 posedas la tekston:
INTERNACIA KONFERECO PRI ESPERANTO PROPAGANDO
28–30.03.1986
3000 VRACA BULGARIO

En la stampomezo terglobo kun E-stelo.
Koran dankon al Amouroux kaj al s-ano Todorov pro la sciigo.

Jen Malto 3

Al ĉiuj 315 gratulintoj okaze de la 25-jariĝo de la Esperanto Societo Malto ĝia estraro sendis memorigan koverton kun poŝta esperanta stampo! En la julia numero de la revuo "esperanto" estis anonco pri tiu jubileo (ne pri la stampo). Ankaú mi sendis gratulojn kaj kun granda surprizo ricevis tiun filatelaĵon. La ronda kun la dato: 31-10-86 el VALLETTA/MALTA posedas la tekston: ESPERANTO SOCIETO (MALTA) 1961–1986 kaj ĝi montras ankaú Esperanto-stelon.

La stampoj estis tre pure surstampitaj. Nepre mencienda estas, ĉar aliaj landaj asocioj tion kutime ne praktikas, ke la sekretario de la ES Malto sciigis al ni la aperon de tiu stampo (post la apero). Dankon al samideano Vella-Bondin, kaj gratulon al ESM pro la filatela aktivado!

Pri LUK 2-3 (datoj)

Denove estis nia kluba amiko Jean Amouroux, kiu sendis al la redaktoro valoran sciigon, pri la uzo-tempo de LUK 2-3. Li ricevis sciigon de la "Direction des postes – Office des timbres." Laú ĝi tiu stampo estis uzita en la poŝtejo de Ettelbruck de 16–31.7.84. Bedaúrinde mia ekzemplero ne permesas komparon, ĝuste la dato ne estas legebla. Tamen mi forte supozas, ke ni devas korekti la datojn en nia suplemento 1985. Bonvolu tion fari.

Pri AU 20 (variaĵoj)

Kiel unua el ni nia kluba amiko Richard Hirsch atentigis pri diversaj mezuroj de la ms AU 20 kaj kserokse dokumentis tion. Nia aldono por la suplemento 85 en n-ro 70 tamen koncerne la mezurojn plene fiaskis, kion rimarkis nia amiko Manninger. Li nun siavice ekaktivis, mezuris siajn posedaĵojn, kaj ŝajne trovis 3an variaĵon! AU 20-1 posedas mezuron de tridekkvar dudektri (34x23).

Ni ne diskutu pri duonaj milimetroj! En tiu variaĵo ni trovas, ke en la dua linio iom suben falis la "n" de la vorto "internationale", kaj en la tria linio iom falis suben la "In" el la vorto "Intern" Almenaú ĝis 31.1. tiu variaĵo funkciis.

Jam 28.2. funkciis variaĵo kun la mezuro tridektri x dudekunu (33x21). En ĝi la subenfaloj estas korektitaj. Tamen Manninger skribas pri stampo, longa 40 mm. Respondon mi ankoraú atendas. En tiu variaĵo estas streketo inter ESPERANTO MUSEUM. Sekvontfoje pli pri ĝi!

Hungario 100

La centa poŝta esperanta stampo en Hungario estis uzata 28.12.1986 dum la 16a VINTRA ESPERANTISTA FERIO en Budapest. Tiu stampo posedas la saman vizaĝon (aspekton) kiel tiu de la 14a VEF. Sola diferenco estas la numero. Nia kluba amiko Radnai faris memorigajn kartojn kaj kovertojn okaze de la 16a VEF. Koran dankon al niaj amikoj Radnai kaj Fekete, kiuj sendis detalajn informojn pri tiu centa stampo.

Kubo 1 (KU 1)

Nia kluba amiko Figueredo sendis novaĵ-informilon 4/87 de la kuba poŝta ministerio pri la pm-eldono CENTJARA JUBILEO DE ESPERANTO. Sur ĝi ni trovas sciigon kaj bildon pri la unua kuba poŝta E-stampo. Tiu stampo estas ronda kaj posedas hispane la tekston:
CENTENARIO DEL ESPERANTO/UNUA TAGO/
HABANA 6/PRIMER DIA/16 MAR. 1987

En la stampomezo Esperantostelo sur la kuba insulo. Dankon al vi, amiko Figueredo. Korajn gratulojn al KEA!

Aldoni mi devas ĉi-loke, ke hieraŭ min atingis la revuo "esperanto" de UEA kun artikolo de Simo Milojeviĉ pri la movado en Kubo. En ĝi noto, ke jam dum lia vizito en Kubo pretis la grafikaĵo de la E-pm. Li intencis instigi eldonon de E-pm! Kun rideto mi tion legis, sed ankaŭ kun ĝojo. Eĉ nefilatelistoj en nia movado klopodas pri aperigo de E-filatelaĵoj, tion mi trovas bona!







Novaj tutaĵoj

La Esperantogrupo Soltau

en la Germana F R mendis ĉe la federacia poŝto 1.500 pecojn da memorigaj jubileaj poŝtkartoj kun nominalo de 60 pfenigoj. La poŝtkartoj estas presitaj en la presejo de la federacia poŝto en Okcidenta Berlino kaj posedas maldekstre en verda nian jubilean emblemon. Gratulon al la grupestro de tiu Esperantogrupo, kiu iniciatis la eldonon de tiu ĉi jubilea filatelaĵo! Dankon ankaŭ al nia kluba amiko Werner Heimlich, kiu informis la redaktoron. La jubilea poŝtkarto ests havebla en nia estas stampobanko.

GDR 46-2

En GDR aperis novaj poŝtkartoj kun ŝanĝita koloro: oranĝa. Tio okazis pro enkonduko de legiloj por poŝtkodoj. Pro elĉerpiĝo de la E-pk GDR 46 kaj 47 oni presigis de 46 novan kvanton de 1.500 pecoj. Sekve nun ekzistas la surpreso sur verdaj (46-1) kaj sur oranĝaj (46-2) poŝtkartoj.

Jubilea Esperanto-poŝtkarto en Hungario

La hungara poŝto eldonos 1987 jubilean Esperanto-poŝtkarton kun surpresita Esperanto-poŝtmarko. Eldonkvanto: 50.000 pecoj. Tion sciigis al mi nia kluba amiko Fekete el VEF 16a. La eldontago ankoraŭ estas nekonata.

Esperanto-temaj tutaĵoj en Sovetunio

Da ili ekzistas multaj! Mi ne pensas pri tiuj poŝtaj kartoj kaj kovertoj kun E-surpresaĵoj "Poŝta Karto" (k.a.) Mi pensas pri tiuj poŝtkartoj kaj marko-kovertoj, kiuj montras personojn, kiuj aŭ estis mem esperantistoj, aŭ kiuj simpatiis kun Esperanto. Aperis ekzemple pluraj markokovertoj pri la "Heroo de Sovetunio" Kuznecov, kiu estis pasia Esperantisto kaj konata batalanto kontraŭ faŝismo kaj por la liberigo de sia lando el sub la jugo de la faŝist-germana okupado. Plurajn tutaĵojn ni konas de Ciolkovski, kiu estis membro de la iama SEU. Ni konas tutaĵojn pri la popolkomisaro Lunaĉarski, kiu trovis bonajn vortojn pri Esperanto. Kaj laste mi el Leningrado ricevis poŝtan faldkarton kun markokoverto pri la "Domo de amikeco kaj paco kun popoloj de aliaj landoj". En tiu palaco lokiĝas ankaŭ la leningrada filio de ASE. Tie okazas renkontiĝoj de leningradaj kaj eksterlandaj esperantistoj. Kion mi volus rekomendi al vi, tio estas, ke vi serĉu ankaŭ tiujn tutaĵojn. Ili estas bezonataj por aranĝi filatelajn E-ekspozaĵojn. Se vi ekzemple intencas filatele dokumenti la SAT-kongreson en Leningrado, ne sufiĉas montri nur la certe raran stampon kaj la E-pm de tiu kongreso. Ekzistas poŝtaj bildkartoj pri la Taúrida Palaco, kongresejo tiam, kaj tutaĵoj de Lunarĉarski, kiu direktis salutojn al la SAT-kongreso! Montru tiujn materialojn. Kun klarigaj vortoj kompreneble.







ОКРЪГ

БЛОК ВХ АП. №

Ni – en ekspozicioj

Richard Hirsch

Meze de oktobro 1986 nia kluba amiko Richard Hirsch ekspoziciis en la FRG-a Hannover okaze de la centjara jubileo de la poŝtmarka klubo Hannover. Ligita kun tiu aranĝo estis la 40-a ligotago de la "Ligo de Germanaj Filatelistoj". Li akiris medalon en vermejla rango kaj honoran premion. Gratulon al vi!

Stefano Fekete

En septembro 1986 okazis en Baku (Sovetunio) Sovetunia-hungara poŝtmarka ekspozicio. Stefano Fekete ekspoziciis la ekspozaĵon "Esperanto kaj la sociala progreso". Li ricevis medalon en arĝenta rango. Gratulon al vi!

Gert Drucker

Dum la Brazila Esperanto Kongreso 1986 nia kluba amiko Drucker prezentis parton el sia kolekto en la ejoj de la filatela agentejo en Curitiba. Kun granda intereso la kongresanoj kaj aliaj vizitantoj rigardis tiun ekspozicion. Gratulon al vi!

Rudolf Burmeister

montris la filatelan ekspozaĵon pri Esperanto en pm-ekspo Volgograde en novembro 1986. Vizitantoj el Karl-Marx-Stadt informis, ke en la ekspozicio troviĝis dua filatela E-ekspozaĵo. Verŝajne el CSSR. La ekspozinto ne estis konata. Mi supozas, ke estis Vlastimil Koĉvara el Opava?

Ihsan Zulfikary

venos al la Jubilea Kongreso kaj deziras, ke ni montru filatelan ekspozaĵon pri Esperanto en la kongresejo. Volonte ni tion farus, sed tio dependas de la LKK! Eble ni sukcesos, aú en la kongresejo aú en iu el la proksimaj kulturcentroj alilandaj. Povas ankaú esti ke ni ne sukcesos – ni vidu!

Dolfa Bartoŝik

nia "dojeno" kaj pioniro de nia esperanta filatelo laú rekomendo de Ĉeña Filatelista Asocio ekspozis sian E-ekspozaĵon (80 folioj) en la urbo Vodnany/CSSR. Li ricevis *orumitan* medalon kaj objektan premion. Tio estis la plej altranga medalo en tiu ekspozicio! Ni kore gratulas al vi, kara Dolfa Bartoŝik!

Note: ĉu vi jam ricevis duan 69an numeron de LVL?

Anonco:

Se vi volus aĉetis aú interŝanĝi glumarkojn, kontakti
Vilmos RADNAI, P.O. Box 40, H-2331 DUNAHARASZTI, Hungario.

Esperantokartoj kaj -kovertoj

Kristnaska Triptiko el Belgio

Nia kluba amiko Jan Torfs aperigis okaze de la eldono de memoriga poŝtmarko pri Felix Timmermanns memorigan karton kun teksto esperanta pri tiu fama flandra verkisto kaj desegnisto. Torfs prizorgis kvanton da tiuj kartoj, kies Timmermanns-pm ricevis memorigan poŝtan stampon pri tiu persono en la urbo Lier. La tuto estis bone uzebla por filatela ekspozaĵo! Gratulon al nia amiko Torfs!

– Bela Nederlando	Kolora bildkarto de Libro-Servo FLE
– E – 100 godini (jaroj)	Jubilea koverto el Bulgario
– 57a Itala E-kongreso	Koverto eldonita de LKK
– E-Societo Malta	Koverto kaj pk
– Int. Jaro de PACO	3 bildkartoj el CSSR
– Mondpacon-ne mondfinon	karto el Hungario (de Radnai)
– 10. E-Konferenz . . . DDR	Koverto el Schwerin/GDR/1986
– Potsdam salutas vin	Kolora bildkarto de GDREA
– Kalendareto 87	Pluraj eldonitaj de ILKKC (Ĉinio)
– Kalendareto 87	Int. E-Kursejo Pisanica

Aliaj pri ni


Nia Esperanto-filatelo en Kuba Radio

La juliaj elsendoj de "Semajna Revuo", ĉiudimanĉa programo de Kuba Radiostacio "Radio Reloj" (= radio horloĝo – hispanlingve) dediĉis sian atenton al la Esperanto-filatelo. La programero "Esperanto-filatelo", elsendita plurfoje dum ĉiu julia dimanĉo, pritraktis materialon el same nomita materialo dekpaĝa de nia kluba amiko Figueredo, publikigita originale en la numero januaro-aprilo 1980 de "Filatelia cubana".

En aliaj elsendoj de "Semajna Revuo" oni plurfoje disvastigis aliajn pri-esperantajn informojn, ricevitajn de Kuba Esperanto Asocio. Jen, karaj klubaj geamikoj, informoj, kiuj mirigas, ĉar ĝenerale oni ne multon ekscias pri la granda nuna aktivado por Esperanto en Kubo. KEA ŝajne eĉ ne posedas propran bultenon aŭ gazeton. Sendube pro grava manko de papero en Kubo. Tamen en tiu de ni fora lando nia Esperanto-movado pompas kaj floras!

"La Mondo", Ĉinio

La verŝajne plej granda movada gazeto en sia decembra eldono de la jaro 1986 enhavas artikolon pri ELF/AREK kaj pri la E-filatelo. Ĉinigis ĝin nia kluba amiko Song Shengtan. La artikolon akompanas portreta foto de la artikol-aŭtoro. En tiu gazeto aperis ankaŭ tiu Zamenhofa portreto, kiun grafikis nia Dolfa Bartoŝik.



Niaj Esperanto-glumarkoj

Vizitu Hungarion (I.)

Eldonita fine de 1986. Nedatumita. Desegnis: Radnai, Eldonis: Cervello. Eldono en 5 kolorvariaĵoj po 100 folioj. A: sendenta, B: dentumita.
En la folio 5 diversaj kaj diversmezuraj glm:
1) Bazilio Esztergom, 2) Preĝejo Mateo Budapest, 3) Preĝejo Kalvinano Debrecen, 4) Katedralo Szeged, 5) Katedralo Pecs
a) nigra/ruĝa, b) nigra/flava, c) nigra/bruna, d) nigra/blua e) ruĝa skribo/nigra

2a DUJARA EKSPOZICIO DE ESPERANTO

11–25 oktobro 1986 en Terrassa, eldonita en oktobro 1986.
Eldonis: Cervello. Eldono en 12 kolorvariaĵoj po 100 folioj.
En la folio 6 diversaj samformataj markoj. Ĉiuj variaĵoj posedas verdan tekston kaj verdan stelon. La sekva priskribo unue notas koloron de la kadro, poste de la bildo:
1) ora/blua, 2) ruĝa/nigra, 3) ruĝa/griza, 4) ruĝa/blua, 5) ruĝa/flava, 6) blua/ora, 7) blua/nigra, 8) blua/flava, 9) blua/ruĝa, 10) flava/ruĝa, 11) flava/nigra, 12) flava/blua

1887–1987 100 jaroj de Esperanto

Eldonita en januaro 1987.
Eldonis: Cervello. Eldono en 12 kolorvariaĵoj po 100 folioj.
En la folio 4 samaj kaj sammezuraj markoj. Ĉiuj variaĵoj posedas du verdajn stelojn kaj tekston de Zamenhof EL LA 1a LIBRO DE ESPERNTO. La sekva priskribo unue notas koloron de la kadro, poste la koloron de la teksto:
1) nigra/flava, 2) arĝenta/ruĝa, 3) helblua/flava, 4) helblua/ruĝa, 5) blua/ruĝa, 6) blua/flava, 7) karmezina/nigra, 8) karmezina/blua, 9) flava/nigra, 10) flava/blua, 11) ruĝa/nigra, 12) ruĝa/blua

100 ANOS ESPERANTO	(Brazila glm kun la jub. emblemo. Arĝ./verda)
M. Andreasson, SVE	(adres-glm kun la jub. emblemo. Arĝ./ni)
Kultura E Festivalo	(17–19 de majo 1986 en Uppsala. Ronda)
Vino de Cassis – Esp.	vin-etikedo multkolora)









1986-08-12

Korajn salutojn el
la 42-a Internacia
Junulara Kongreso
en Neurim, Israelo.
Jehoŝua Tilleman
En la nomo de la LKK

S-ano [illegible] Kubczy
P.O. Box 449
PL-42-217 Czestochowa
Pollando

6 Novo kaj antikvo en Jerusalemo, la ĉefurbo de Israelo



Jerusalem
1. Yemin Moshe with Montefiore's Windmill
2. Ramot Eshkol
3. The Citadel
4. The Old City



4975

Suplemento 87/1

por nia stampo-katalogo de 1983. Komparu ankaú la suplementon 1985 kaj la suplementon en n-ro 70 de nia LVL. La jaro 1986 liveris al ni 16 novajn stampojn (kiel jam 1985). Krome ni trovis 2 nekonatajn stampojn el la jaroj 1985 kaj 1972. Mi certas pri tio, ke ekzistas aliaj al ni ne konataj stampoj. Laú miaj notoj per la dato 28.12.86 mi listigis 701 poŝtajn E-stampojn (+ 34 AF kaj 6 AP). La variaĵojn mi ne nombris.

AU	20:	Korektu la mezurojn en suplementa listo de LVL 70			
BU	15:	Nur en nigra kolora ili estas oficialaj			
LUK	2-3:	Korektu la daton (1984, 16–31.7)			
BE	14A:	Charleroi	1972 . . .	E-Langue Int. Aux.	ms
BU	16:	Vraca	1986 28–30.03	Int. Konf. E-Propagando	
HU	100:	Budapest	1986 28.12	VEF 16a	
ISR	1:	Neurim	1986 14–21.08	TEJO-kgr 42a (ĉu vere poŝta?)	
JU	29:	Slavonski Brod . . .			
		Zagreb	1985 28.01	Semajno de Argentino (nova!)	
		Ljubljana	1985 30.04	Fervojista Jubileo (JAFE)	
		Skopje	1986 18.05	IFEF-kgr 38a 1) presita, 2) stampita	
KU	. . .	Habana 6	1987 16.03	100 jaroj E	
		Noto: Mi hezitas doni numeron, sekvontfoje certe!			
MAL	3:	Valletta	1986 31.10	E-Societo Malta 25 jaroj	

Atentu! Preskaú ĉiuj notitaj stampoj haveblas en nia stampobanko!









22-a Kataluna Kongreso de Esperanto

Lleida atendas vin

31.10.-2.11.1986.

